Traduko de "1932 års Supplement till 1931 års jubileumsmatrikel".

Sveda Esperanto-Federacio. S.E.F.

La aldono de la jaro 1932 al la jubilea matrikulo.

Raporto pri la stato de la esperantomovado je la fino de 1931 kaj matrikulsciigoj je federaciaj anoj, kiuj aliĝis post la presado de la jubilea matrikulo en aprilo 1931.

Presejo: Sturetryckeriet, Stockholm 1932.

La stato de la esperantomovado en la mondo je la fino de la jaro 1931.

De Stellan Engholm.

Kvardekkvin jaroj forpasis, post kiam Zamenhof aperigis la unuan lernolibron pri esperanto. Ke esperanto dum ĉi tiu periodo progresis, estas evidente por ĉiu, kiu iom konas la movadon. Metu la unuan malgrandan lernolibron apud tiujn librojn, gazetojn kaj ceterajn presaĵojn, kiuj ĝis hodiaŭ aperis en esperanto, kaj ni tuj havas tre elokventan pruvon pri la disvastiĝo de la lingvo. Komparu la unuajn palpantajn provojn por praktike uzi esperanton kun ĝia multfaka kaj vasta uzo en niaj tagoj. Metu la unuan solan pioniron apud tiujn arojn de esperantistoj, kiuj nun ekzistas en ĉiuj landoj de la mondo. Tiaj komparoj estas pli elokventaj, kaj certe ankaŭ pli fidindaj ol tiuj vidpunktoj, kiuj kelkfoje aperas dum senteme akcentataj diskutadoj pri la valoro kaj etendeblecoj de la esperanta movado.

La resumo pri la nuna stato de la esperantomovado en la mondo, kiu jene estos donata, estu argumento por tiu afero. Kompreneble ĉi tio ne signifas, ke ni krucigu la brakojn kaj estu kontentaj kun tiuj rezultoj, kiuj jam estas akiritaj. Ĉi tiuj rezultoj ne signifas, ke ni atingis la finan celon. Anstataŭe ĉiu el ĉi tiuj rezultoj signifas la kreon de novaj eblecoj por plua laboro. Estas forĵete de tempo kaj energio la diskutado pri tio, ĉu esperanto progresas rapide aŭ malrapide. Estas pli bone plejeble multe provi uzi kaj plukonstrui la rezultojn, kiujn ni jam atingis.

La eblecoj por rezultriĉa laboro por esperanto estas pli favoraj ol iam antaŭe. La progresoj de la lastaj jaroj tiom intime kunigis landojn kaj mondpartojn, ke la bezono de internacia lingvo evidentiĝis ankaŭ por tiuj, kiuj staras tute fremdaj al la esperanta movado. Por bona uzo de ĉi tiu favoro situo, ni tamen devas kapti ĉiujn eblecojn por racia uzado de nia lingvo. Ĉi kune mi permesas al mi citi la pripensindajn vortojn el tiu resumo pri la stato de esperanto, kiu estas presita en aldonaĵo en la januara numero de Germana Esperantisto por 1931:

"La mizerstato de Eŭropo tamen malhelpas la propagandlaboron kaj malpliigas laŭcifere la rezulton. En nia reala mondo la nombro de la anoj tamen ne estas la decida, sed la eblecoj uzi esperanton kaj la nombro de ili, kiuj uzas ĝin. Kiam ni povos montri je la uzebleco de esperanto, kiam ni povos montri je materiaj avantaĝoj, tiam la nombro de tiuj, kiuj uzas esperanton, kreskos. Kiu kun bona rezulto enkondukis esperanton en iun gravan entreprenon, signifas pli por esperanto ol miloj da personoj, kiuj post entuziasma fino de la studoj, ne praktike uzas sian akiritan sciadon, kiuj indiferentiĝas kaj fine tute malaperas el la movado. — La tempo laboras por ni. Estas nia tasko provi sekvi la postulojn de la tempo."

Ĉi tio kiel enkondukon de eble iom seka kaj cifera resumo pri la situo de esperanto en la mondo ĝuste nun. Sed permesu al aldoni ankoraŭ kelkajn vortojn. Kelkaj eble ne kontentiĝas nur per konstato de la progreso, sed ankaŭ rigardas la ideon kaj la celon. Kion signifas esperanto por la esperantistoj? Ĉu la origina idealismo vivas, aŭ ĉu oni nur laboras por iu fiksa ideo, je kiu oni subite mallaciĝos? Aŭ ĉu nia lingvo eble nur fariĝos teknika helpilo en la servo de la maŝinkulturo? Kiel respondon je tiaj demandoj mi ne montros ciferojn aŭ konkludojn. Anstataŭe mi petas al vi fari penseksperimenton. Imagu al vi, ke esperanto kiel lingvo kaj movado subite nun estus tute forigata de la mondo. Ke niaj organizoj ne plu ekzistus, ke niaj amikecaj rilatoj kun samideanoj de ĉiuj partoj de la mondo estus nur bela sed trompa sonĝo, ke niaj gazetoj kaj nia literaturo estus malaperintaj sen postsigno, ke ni mem eĉ ne memorus, ke ĉi tio iam ekzistis. Tiu sento, kiun tia penseksperimento aperigas, restu ĉe vi kiel respondon je la demando, kion esperanto signifas por ni, kion signifas por ni pluenkonduki nian aferon.

La Ligo de Nacioj.

Estas ja konate, ke la Ligo de Nacioj traktis la demandon: esperanto kiel internacia lingvo! Laŭ propono de kelkaj delegitoj oni pretigis raporton pri la stato de la esperanta movado kaj ĝia taŭgeco kiel internacia lingvo. Per sia aprobo de ĉi tiu raporto kaj kelkaj en ĝi faritaj proponoj, la ligo, en la jaro 1923, donis sian oficialan aprobon pri esperanto kiel internacia lingvo. 1924 oni rekomendas al la liganoj aprobi

esperanton kiel klaran lingvon en telegrafio kaj radiotelegrafio, kio estis aprobata de la Internacia telegrafasocio 1925, por pli detalaj raportoj pri ĉi tio, vidu "Historio de la lingvo Esperanto".

Dum pasinta jaro la Brita asocio por La Ligo de Nacioj (League of Nations Union) petis ĉe la asocio, ke ĝi plejeble baldaŭ aranĝu internacian pedagogian konferencon laŭ gvido de la Centra pedagogia laborsekcio en Genéve. Gi diros sian opinion pri la bezono de internacia lingvo kiel ilo por plifortigo de internaciaj rilatoj, kaj, en okazo, ke oni trovas tion dezirinda, doni sian opinion pri tio, kiu lingvo plej bone konvenas por ĉi tiu celo.

La Internacia laboroficejo.

La internacia laboroficejo en Genéve uzas esperanton depost 1922. Dum la konferenco en Genéve 1929 oni konstatis, ke "esperanto ebligis la atingon de kontakto kun personoj kaj institucioj, kun kiuj alie estus malfacile atingi rilatojn". Raporto en esperanto (Bulteno de la Internacia Laboroficejo) estas regule eldonata en 10,000 ekz. La delegitoj de U.E.A. en diversaj landoj tradukas ĝin al siaj lingvoj, per kiu aranĝo ĝia enhavo estas konigata en ne malpli ol 63 landoj. (laŭ raporto por jaro 1930).

Internaciaj organizoj.

En la internaciaj organizoj oni havis bonan okazon konstati, kiom malavantaĝe estas la neceso de uzo de pluraj lingvoj malfacile lerneblaj. Multaj proponoj ankaŭ aperis pri la uzo de internacia lingvo anstataŭ la multaj naciaj lingvoj. Tiaj proponoj venis ankaŭ de personoj, kiuj ne estas esperantistoj. Ofte oni ankaŭ interkonsentis uzi internacian lingvon, tiom, kiom nuntempe estas eble, kaj la elekto senescepte falis je esperanton. Ĉi tie resumo pri la plej gravaj de ĉi tiuj organizoj estas donata.

Ĉe la Internacia kongreso de la radi-amatoroj en Paris la 19an de aprilo 1925 esperanto estis akceptata kiel radia helplingvo. Proponanto: American Radio Relay League. La internacia Radi-unio rekomendis je sia jarkunveno en Lausanne 12 majo 1927 la uzadon de esperanto por radio. La saman proponon oni faris ĉe postajkongresoj. La 3:a Internacia aertrafikkongreso en Brüssel okt. 1925 elektis komisionon, kiu havis kiel celon esplori la eblecojn enkonduki esperanton kiel teknikan lingvon por la aertrafiko. La internacia kongreso de teknika gazetaro en Paris 1915 akceptis esperanton kiel oficialan lingvon apud la naciaj lingvoj kaj rekomendis la eldonon de teknikaj artikoloj kaj resumoj de teknikaj laboroj en esperanto. La 25:a Internacia packongreso en Geneve 1926 rekomendis al la tutmonda asocio de pacorganizoj la tradukon al esperanto de ĉiuj paroladoj en naciaj lingvoj depost 1931. La Germana pacasocio petis al siaj membroj lerni kaj uzi esperanton. Ĉe la intern. kongreso de la unio "Paco per la lernejo" en la pasko 1927 en Prag, ĉiuj paroladoj estis tradukataj al esperanto. Ĉe la kongreso de La mondasocio de pedagogiaj unioj en Geneve 25:a de juli -- 4:a de aug. 1929, oni uzis esperanton kiel solan traduklingvon en kelkaj kunvenoj. 4. kongreso por Nova Eduko en Locarno sept. 1927 decidis uzi esperanton kiel solan traduklingvon depost la posta jaro. "La Instituto por spirita kunlaboro" en Paris (kreitaĵo de Ligo de Nacioj) uzas depost 1926 ankaŭ esperanton por siaj internaciaj informoj. La kongreso de Int. abstinecasocio de fervojistoj en Stockholm 1927 aprobis tutvoĉe rezolucion favora por esperanto. Ĉe la 15. int. stenografkongreso en Budapest 1928 oni ekzeptis rezolucion, en kiu la kongreso i. a. rekomendas la enkondukon de esperanto kiel rimedon plifaciligi la internacian trafikon kaj plifortigi la harmonion inter la popoloj. Similan rekomendon faris la Intern. kongreso de stenografistoj en Paris 1931. Konferenco de grandmajstroj de eŭropa Odd-Fellow-loĝio en Amsterdam 1929 faris por esp. favoran rekomendon. Ĉe la L:a konferenco de eŭropas Rotary distriktoj en Haag 1930, la distriktprezidanto por Anglujo dro Mander ricevis oficialan komisionekkoni esperanton kaj doni raporton pri tio. Oni intencas enkonduki esperanton kiel kongreslingvon. La L:a Mondkongreso de Informoficejoj, instituto por kreditasekuro kaj enkasigorganizoj en Wien 1930 decidis enkonduki esperanton kiel helplingvon. La 5:a Internacia kongreso por internacia turistpropagando en Warszawa 14 - 22 sept. 1929 rekomendis, ke oni devus dediĉi pli grandan atenton al esperanto en la turisma propagando. 3. Sudamerikana kongreso por turismo en Rio de Janeiro 1930 rekomendis la eldonon de flugfolioj kaj kompendoj en esp. kaj la enkondukon de esp. en tiuj publikaj lernejoj en tiuj landoj, kiuj apartenas al Sudamerika asocio por turismo. Motivado: esperanto estas la plej facila kaj plej bona lingvo por interpopolaj rilatoj. Internacia transportlaborista asocio

en Amsterdam eble en pli alta grado ol iu alia internacia organizo uzis la eblecojn de esperanto. La asocio devas havi kontakton kun transportlaboristoj en ĉiuj partoj de la mondo, homoj, kiuj parolas ĉiujn lingvojn de la mondo, sed kiuj ne povas sin komprenigi internacie. Ĉi tiu asocio eldonas regule bultenojn en esp. kaj uzas esp. por sia korespondado. Internacian gazeton por la transportlaboristoj oni eldonos tuj, kiam sufiĉe multaj estos abonintaj. Ankaŭ Internacia loĝio de bontemplanoj, skoltaj organizoj kaj aliaj organizoj rekomendis esperanton.

La ĉi supra estas nur ero de la sciigoj pri la internaciaj organizoj kiuj trovis, ke internacia helplingvo estas necesa, se ili povos plenumi siajn taskojn en kontentiga maniero.

Mezan pozicion inter puraj esperantaj organizoj kaj la supre menciitaj havas tiuj specialorganizoj, fakaj kaj idealismaj, kiuj kreiĝis inter la aroj de la esperantistoj mem. Laŭ laste riceveblaj informoj ili estas proks. dudekkvin. La plej gravaj estas bone konataj de ĉiuj esperantistoj kaj pro tio ne ĉi tie nombrataj. Cetere oni trovas ilin en la jarlibro de U.E.A. La plej granda el ili estas Sennacieca Asocio Tutmonda. Ĝia esenca tasko estas kolekti laboristojn de diversaj landoj sen konsidero al partidirektoj en komunan organizon por tiamaniere krei fratiĝon kaj pli grandan akordon inter ili. S. A. T. faris eksterordinare grandvaloran laboron tiel por internacia klerigado kiel por la disvastigado de esperanto.

Kelkaj el ĉi tiuj organizoj kompreneble ne estas tre konsiderindaj cidere rigardataj, kaj eble ankaŭ ne iĝos tiaj, se ilia interesosfero estas tro malvasta. Sed komuna por ili ĉiuj estas, ke ili uzas esperanton kiel rimedon por internacia kunlaboro. Per ĉi tio maniero oni faras esperanton vere vivanta lingvo en la servo de la praktika vivo.

Esperanto kaj la blinduloj.

Inter la blinduloj esperanto ludas gravan rolon, kaj pro tio ĝi tie akiris ĝeneralan atenton. Pruvo por ĉi tiu estimo estas la fakto, ke ilia esperanta gazeto"Esperanta Ligilo" ĉiujare ricevas ekonomian subtenon de 23 blindulinstitucioj en 14 landoj. En la jaro 1930 oni instruis esperanton devige aŭ libere en 8 el la 24 germanaj blindulinstitutoj, en ĉiuj nederlandaj, en 1 el la francaj, en la plej granda de Belgujo, en ĉiuj kvar polaj, en ĉiuj 3 jugoslavaj, en ĉiuj 3 ĉekoslovakaj, en la du plej grandaj italaj, en 1 norvega, kaj en kelkaj rusaj kaj japanaj blindullernejoj.

Radio.

La radio kunigis intime diversajn partojn de la mondo en maniero, pri kiu oni antaŭe ne povis revi. Sed tamen, kio koncernas la parolatan vorton, ĉi tiu intima kontakto por la plej multaj aŭskultantoj estas nura orela percepte de sensencaj aroj de sensencaj vortoj.

Kompreneble ne ĉiuj punktoj en la radia programo de la diversaj landoj povas esti faratj kun konsidero al la internacia publiko. Estus absurde kaj senracie peti tion. Sed estus egale absurde kaj senracie ne kapti tiujn eblecojn por intenacia kontakto, kiujn prezentas la radio. Bonaj paroladoj senataj de la grandstacioj de diversaj landoj en lingvo, kiu estus komprenata de aŭskultantoj en ĉiuj landoj, certe efikus pli por paco kaj internacia akordo ol ĉiuj pac- kaj akord-kongresoj kune.

Kaj la fakuloj kaj la aŭskultantoj tamen plejofte komprenis, kian bonan helpon la radio havus per esperanto. Ĉe tiu konferenco, kiun la asocio de internaciaj radiokompanioj aranĝis en Lausanne 1927, oni instigis la sendstaciojn prove enkonduki regulan sendadon de la semajnprogramoj en esperanto. Krome en esperanto sendi mallongajn informojn pri pli gravaj okazoj en la spirita, arta kaj socia vivo de la respekt. popoloj. Ĉi tion decidon la estraro de la asocio akcentis dum sia kunveno en Gomo saman jaron. Gi petis la membrojn antaŭ ĉio daŭre havi la esperantan instruadon en siaj programoj.

Laŭ de la Komisiono por radiostatistiko donitaj informoj, ĝis la fino de 1929 pli ol 10,000 esperantaj disaŭdigoj okazis. Gi tiuj sendadoj okazis en 212 stacioj en 34 ŝtatoj en ĉiuj mondpartoj.

Dum 1931 okazis pli ol 1500 esp-sendadoj de 61 statioj en 17 eúropaj landoj. Statistiko de ceteraj mondpartoj ne ankoraŭ estas finita. La plej multaj sendadoj konsistas el informoj en esperanto aú paroladoj en aú pri esperanto. La nombro de gazetoj, kiuj enkondukas la de la komisiono kompilita programo por esp-sendadoj, pli- kaj pligrandiĝas. Inter svedaj gazetoj kunprenataj en ĉi tiu listo oni rimarkas Arbetaren (La laboristo), Arbetet (La laboro) kaj Eskilstunakuriren.

Internaciaj esperantokonferencoj. (Kunvenoj kaj traktadoj nure en aú pri esperanto.)

1. konferenco 1922 en Geneve, lernejteknika konferenco (Instituto J. Rousseau). 96 delegitoj de 28 landoj rekomendis tutvoĉe post objektiva esploro esperanton kiel lernfakon en la lernejoj de la kulturlandoj.

2. konferenco, komercteknika okazis en Venedig 1923. La kunvokanto: Itala komerca ĉambro por Svisujo, 150 delegitoj de 27 landoj en ĉiuj mondpartoj. Rekoemdnsi tutvoĉe esp. kiel int. lingvon por komerco kaj trafiko.

3. konferenco, 1924 en Geneve, preparanta konferenco por int. radiotelefonio, kunvokita de Société Radio-Elektrique. 35 delegitoj por radiokompanioj kaj administrantoj en 29 landoj rekomendis tutvoĉe esp. kiel radiolingvon.

4. konferenco Paris 1925, estis la unua scienca konferenco por esperanto. 230 delegitoj por grandaj sciencaj kaj teknikaj organizoj en 36 landoj postulis tutvoĉe la uzon de esp. kaj donis proponon pri ĝia uzado en la scienco.

5. konferenco, Paris 1925, estis la dua konferenco por esperanto en komerco kaj industrio. Kunvokita de la foirestraro kaj la komerca ĉambro de Paris. 11 ministerioj, 123 komercaj ĉambroj, 43 komerc- kaj trafik-korporacioj, 14 mondfoiroj kaj 193 komercaj entreprenoj estis reprezentataj. Esperanto estis tutvoĉe rekomendata kiel komerc- kaj trafik-lingvo, direktlinioj estis faratajn por ĝia uzado.

Internaciaj esperantokongresoj.

1. 1905 en Boulogne-sur-Mer, 688 partopren. el 20 landoj.
2. 1906 en Geneve, 1200 partopren. el 30 landoj.
3. 1907 en Cambridge, 1314 partopren. el 35 landoj.
4. 1908 en Dresden. 1500 partopren. el 40 landoj, 7 oficialaj reprezentantoj.
5. 1909 en Barcelona, 1300 partopren. el 32 landoj, 19 oficialaj reprezentantoj.
6. 1910 en Washington, 357 partopren. el 20 landoj, 16 oficialaj reprezentantoj.
7. 1911 en Antverpen, 1800 partopren. el 42 landoj, 26 oficialaj reprezentantoj.
8. 1912 en Krakow, 1000 partopren. el 28 landoj, 11 oficialaj reprezentantoj.
9. 1913 en Bern, 1203 partopren. el 30 landoj, 16 oficialaj reprezentantoj.
10. 1914 en Paris, malokazigita pro la militeksplodo. Sin anoncis 3739 partopren. el 50 landoj.
11. 1915 en San Francisko, 163 partopren. el 16 landoj, 17 oficialaj reprezentantoj.
12. 1920 en Haag, 408 partopren. el 27 landoj, 7 oficialaj reprezentantoj.
13. 1921 en Prag, 2651 partopren. el 35 landoj, 30 oficialaj reprezentantoj.
14. 1922 en Helsingfors, 850 partopren. el 30 landoj, 14 oficialaj reprezentantoj.
15. 1923 en Nürnberg, 4963 partopren. el 38 landoj, 12 oficialaj reprezentantoj.
16. 1924 en Wien, 3400 partopren. el 43 landoj, 8 oficialaj reprezentantoj.
17. 1925 en Geneve, 953 partopren. el 35 landoj, 38 oficialaj reprezentantoj. La somera universitato.
18. 1926 en Edinburgh, 960 partopren. el 36 landoj, 34 oficialaj reprezentantoj.
19. 1927 en Danzig, 905 partopren. el 34 landoj, 34 oficialaj reprezentantoj.

20. 1928 en Antverpen, 1494 partopren. el 36 landoj, 34 oficialaj reprezentantoj. Somera universitato.
21. 1929 en Budapest, 1256 partopren. el 33 landoj, 11 oficialaj reprezentantoj. Somera universitato.
22. 1930 en Oxford, 1211 partopren. el 29 landoj, 12 oficialaj reprezentantoj. Somera universitato.
23. 1931 en Krakow, 722 partopren. el 26 landoj, 6 oficialaj reprezentantoj. Somera universitato.

Krome kolektiĝas ĉiujare specialorganizoj por mondkongresoj: katolikoj, fervojistoj, instruistoj, sciencistoj, k.t.p. La kongresoj havitaj de S.A.T. estas: 123 en Kassel, 1924 en Brüssel, 1925 en Wien, 1926 en Leningrad, 1927 en Lyon, 1928 en Göteborg, 1929 en Leipzig kun 1102 partopren. el 29 landoj, 1930 en London (550 aliĝoj el 25 landoj), 1931 en Amsterdam kun 404 partopren. el 14 landoj. La asocio havas ĉ. 6000 membroj en 35 landoj.

Internacia esperantorganizo.

Oni celas tiun organizon, kiun posedas esperanto por lingva prizorgo kaj lingva propagando. La neŝanĝebla fundamento por esperanto konsistas el "Fundamento de Zamenhof". Laikuloj ofte kredas, ke esperanto disfalos en dialektojn kaj perdos sian unuecon. Sed ĉar ĉiuj esperantistoj aprobas "Fundamento" kiel nedebeneblan bazon por la vivo kaj etendigo de la lingvo, ĉiuj tiaj supozoj estas senbazaj. La unueca evoluo de la lingvo estas kontrolata de Lingvo Komitato kaj Akademio. Koncerne la praktikan laboron ambaú estas kontrolataj de la grandaj kongresoj.

La kongresoj en Helsingfors 1922, Nürnberg 1923, kaj Wien 1924 pluenkonstruis la internacian esperanto-organizon. Ĉiuj naciaj esperantofederacioj elektas reprezentantojn, kaj ĉi tiuj kune kun la reprezentantoj por izolaj internaciaj esperantistoj (unuigitaj en U.E.A.) formas komunan estraron. Ĝi elektas por tri jaroj agantan centran estraron konsistanta el ses membroj. Depost 1925 ĉitiu centra estraro (internacia centra komitato) havas propran sekretariejon, situanta en Geneve. Esperantaj institutoj por unueca reguligo de la instruado kaj ekzamenoj troviĝas en Belgujo, Estonio, Finlando, Italujo, Japanujo, Svedujo, Ĉekoslovakujo, Germanujo kaj Hungarujo.

Universala Esperanto-Asocio. (U.E.A.).

Ĉi tiu neútrala asocio estis fondata 1908 kaj situas en Geneve. La bazo de ĝia fondado kaj agado estas la percepte, ke nure praktika uzado de esp. povas enkonduki la lingvon en internaciajn rilatojn. La asocio posedas delegitojn en ĉiuj grandaj lokoj sur la tero, kiuj sen kompenso pro sia laboro respondas demandojn pri komerco, vojaĝoj k.t.p. Nuntempe la asocio havas proksim. 2000 delegitojn en 80 landoj. La listo de ili troviĝas en la jarlibro de U.E.A. Kiel unuigantan ligilon eldonas la asocio la monatan jurnalon "Esperanto".

Internacia Komerco.

Estus tro multe certigi, ke komuna lingvo estas urĝa neceso por la internacia komerco. Speciale perfektigitaj kaj lertaj oficistoj estas disponitaj, kaj kiom longe oni ne zorgas pri la plikostoj, kiujn la uzado de multaj lingvoj kaúzas, la komercistoj eble ne tiom multe kritikas la nunan sistemon. Tamen ne estas per tio dirite, ĝi ĉiam funkcius senkritike. Aliflanke estas tamen evidente, ke unu por la tuta mondo komuna komerclingvo kaúzus tre grandajn ekonomiajn ŝparojn. Tio ebligus ankaú direktan kontakton kun tiaj firmoj, kun kiu nuntempe estas preskaú maleble ricevi direktan kontakton. Multfoje ankaú esperanto funkcius pli certe ol la naciaj lingvoj. Multaj komercistoj kaj organizoj ankaú komprenis tion, kaj esperanto jam estas uzata en granda amplekso kiel internacia komerclingvo.

Tiel esperanto depost multaj jaroj estis uzata de la grandaj internaciaj foiroj por korespondo kaj reklamo. La franca komerca ĉambro en London skribas en sia organo "Bulletin Mensuel de la Chambre de Commerce Francaise de Londres" (junio 1929): "Kiel aliaj francaj komercoficejoj ankaú la nia plurokaze rekomendis esperanton kiel internacian helplingvon pro tio, ke ĝi estas neútrala kaj ne vundas ies patriotan senton. Por esprimi ĉi tiun percepton de nia komerca ĉambro, nia komercestraro decidis de nun publikigi artikolojn en esperanto pri tiaj aferoj en komerco kaj industrio, kiuj interesas la franc-anglajn komercistojn."

La esperanto-asocio de la komercistoj, kiu situas en Dresden, prenius kiel sian taskon enkonduki esperanton en komerco kaj industrio, aranĝi novajn komercajn rilatojn per helpo de fremdlandaj esperantistoj, zorgi pri la traduko de reklamiloj al esperanto kaj ilia dissendado en diversajn landojn. Esperanto estas la sola internacia komerclingvo de la asocio. Ĝi havas kontakton kun ĉiuj gravaj lokoj en la mondo. Filioj kaj agentejoj ekzistas en Etiopujo, Bulgarujo, Ĉinujo, Anglujo, Francujo, Holando, Italujo, Javo, Palestino, Persujo, Rumanujo, Svisujo, Hispanujo, Ĉekoslovakujo. La asocio eldonas novaĵ- kaj anonc-gazeton. La negoco estas granda.

Dum 1931 la Pariza Komerca Ĉambro, laú raporto de ĝia prezidanto, André Baudet, en la nomo de ĉiuj francaj komercaj ĉambroj proponis esperanton kiel internacian komerclingvon.

Internacia trafiko kaj turismo.

En ĉi tiu fako de internaciaj rilatoj la bezono de komuna lingvo eble estas pli rimarkebla ol en aliaj fakoj. Asocioj de turismo, hoteloj kaj trafikoficejoj propagandas per esperanto. Jam antaúe estas menciite pri la rekomendo de la 5. internacia kongreso por internacia turisma propagando en Warszawa, la aprobo de esperanto kiel "klara" lingvo kaj aliaj similaj faktoj. Inter ŝtataj institucioj, kiuj uzis esperanton por turisma propagando oni povas mencii la japanajn kaj ĉekoslovakajn fervojministeriojn, kiuj per bele ilustritaj kaj bone faritaj turismaj reklamiloj montris sian komprenon por la valoro de esperanto en tia fako. Prospektoj kaj reklamiloj de turismaj asocioj, banlokoj k.t.p. ekzistas en tia amplekso, ke ne estas eble ĉiujn nomi.

La ekspozo por higieno en Dresden, la kolonia ekspozo en Antverpen kaj la ekspozo en Stockholm - 1930 - ĉiuj uzis esperanton kun bona rezulto.

Fine oni povas mencii la de svedaj kaj estonaj esperantistoj fondita Esperanta turista komisiono, nuntempe nomata Esperanta turista asocio, kiu en bonega maniero montris, kom avantaĝa esperanto estas por turismo el ekonomia vidpunkto kaj por ekhavi internacian kontakton kun popolo en fremda lando. Dum la tri lastaj jaroj regulaj malmultkostaj vojaĝoj estis aranĝataj inter Svedujo kaj Estonujo, al Laponio, mallongaj sed bonege planitaj rondvojaĝoj al urboj en la proksimo de Stockholm, kaj malmultkostaj vojaĝoj al la kongresoj en Oxford kaj Krakow. La asocio ankaú prizorgis interŝanĝon de lernejaj infanoj inter Estonujo kaj Svedujo. La aliĝo al la turistaj vojaĝoj inter Svedujo kaj Estonujo kaj tien kaj reen estis tiom granda, ke oni povas esti certa, ke nenia alia turistasocio povas montri similan rezulton. Ne malpleje kontentaj kun la rezulto de ĉi tiuj vojaĝoj estas la partoprenantoj mem. Kaj pro ekonomiaj kaj pro lingvaj kaúzoj certe estus maleble por multaj el ili partopreni en similaj vojaĝoj, aranĝital laú malpli raciaj principoj.

Internacia scienco.

De post multaj jaroj esperanto estis uzata kiel lingvo por sciencaj traktatoj. En ĉiuj partoj de la mondo ekzistas esperantistoj inter la scienculoj, sed ĉefe estas la malproksima oriento, antaú ĉio Japanujo, kiu gvidis sur ĉi tiu kampo. Tio estas facile klarigebla. Internacia scienco uzas, almenaú ĝenerale la germanan, francan kaj anglan lingvojn. Ĉiuj lingvoj estas tre malfacile lerneblaj por japanoj. Pro tio ili kun ĝojo akceptis esperanton. Se iu okaze kredus, ke tio estas tro fortaj vortoj, oni faru tiun rimarkon, ke estas tre granda diferenco inter la percepto pri esperanto ĉe la scienculoj de la Oriento kaj tiu percepto, kiu plejofte estas trovata ĉe iliaj kolegoj en Eúropo. La bezono de internacia lingvo estas multe pli rimarkata ĉe la unuaj ol ĉe la laste nomitaj. Plue estas ĝenerala kaj pramalnova trajto en la intelekta vivo de l'Oriento, ke oni bazas siajn prijuĝojn kaj valorigojn je racia kaj senpartia ekzameno anstataú lasi ĝeneralajn antaújuĝojn kaj kapricajn sentojn esti la bazo de la percepto. Tial la scienculoj de l'Oriento, aúdinte pri esperanto, esploris ĝin, kaj trovinte ĝin uzebla por siaj celoj, komencis praktike uzi ĝin, kaj ĉio kiel la plej klara kaj natura afero en la mondo.

Jen kelkaj faktoj pri tio. Depost kvin jaroj la plej granda meteorologia stacio en Japanujo havas sian ampleksan jarraporten nur en esperanto. - Depost 1927 oni eldonas sciencan revuon "Psikiatrio" en japana kaj esperanta lingvoj. - Ĉe Riken, la granda natursciena esplorinstituto en Tokio, estas multaj esploristoj, kiuj skribas ĉiujn siajn traktatojn nur en esperanto. Ke estas homoj, kiuj legas ilin, pruviĝas plej bone per tio, ke granda parto de ili estas tradukita kaj publikigita en eŭropaj lingvoj.

Ĉe la mondkongreso de la inĝenieroj en Tokio 1929 oni metis traktaton pri "Novaj tipoj de fervojvagonoj en Japanujo", skribita en esperanto kun mallonga angla resumo. - Laŭ ĉe la nomita kongreso sciigitaj ciferoj ĝis tiam estis publikigitaj 28 traktatoj de kuracistoj en esperanto kaj 19 traktatoj de sciencistoj, juristoj kaj inĝenieroj. Post tiam multaj novaj verkoj aperis, sed per la du lastaj jaroj mi ne havas disponeblajn ciferojn.

Inter la lastjaraj informoj de Japanujo oni trovas i.a., ke grupo de farmacistoj ĉe la medicina fakultato de la imperiestra universitato en Tokio eldonis kompendon pri kuraciloj laŭ japana kuracmetodo en kvin lingvoj, inter ili esperanto. Plue oni menciu, ke la japana eŭgenetika instituto en sia monata revuo publikigas artikolojn en esperanto kaj en la sama lingvo aldonas liston pri la japanaj artikoloj.

Ke Japanujo estas en la gvidado koncerne la praktikan uzadon de esperanto por sciencaj celoj, tio ne diras, ke la Okcidentuloj staras ture fremdaj por la afero, eĉ se la simpatio por esperanto ĝenerale estas pli malgranda. Internacia medicina revuo aperas depost 1923. Plue ekzistas scienca uniĝo, Internacia scienca asocio esperantista, kiu depost la jaro 1926 eldonas buletinon en esperanto. El originalaj verkaĵoj en esperanto oni povas mencii "La arto de memdisciplino: Psikagogio" de prof. Charles Baudouin kaj "La homa lingvo" de prof. W.E.Collinson. Grava rekomendo por esperanto kiel helplingvo por la tekniko estas la ĵus aperinta libro de d:ro inĝ. E. Wüster "Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik". Fine oni povas mencii, ke oni en Ameriko ĝuste nun komencis publikigi popularsciencan ĵurnalon en esperanto.

Internaciaj revuoj kaj gazetoj.

Kun ĝenerala enhavo: Esperanto, monata revuo, eldon. de U.E.A., 20 paĝ., eld. 9000-10000; Heroldo de Esperanto, semajna gazeto, ordin. 8 paĝ., eld. ĉ. 3500, eldonata en Köln; Balkana Konkordo, monata revuo por la esperantistoj de la balkanlandoj, eldonata en Sofia.

Socialistaj: Sennaciulo, semajna gazeto, oficiala org. por S.A.T., 8-12 paĝ., eld.4000, eld. en Leipzig; La Nova epoko, beletristika monata revuo, 16-20 paĝ., eld. 1500, Leipzig; Sennacieca Pedagogia Revuo, socialista-pedagogia, eld. ĉiun duan monaton, 32-48 Paĝ., eld. 1000, Leipzig; "ISK", org. por Internacio de Socialista kunbatalo, kvartala revuo, 16 paĝ., eld.1000, Geneve; La Lernanto, gazeto por komencantoj, eld. de SAT, 4 paĝ., eld.10000, Leipzig. Kiel internacia povas nuntempe - ĉar la enhave estas internacia kaj plej grandparte en Esperanto - esti konsiderata La Socialisto, org. por Aŭstria laborista ligo kaj Socialista Esperanto-Asocio (Germanujo), monata, 12 paĝ., Vieno.

Beletristika: Literatura Mondo, literaturo, filmo, arto. 16 Paĝ., 10 numeroj ĉiujare, Budapest.

Pedagogia: Internacia Pedagogia Revuo, monata, org. por tutmonda asocio de geinstruistoj tutmondaj, 20 paĝ., Riesa (Sa.), Germanujo.

Religiaj: Espero Katolika, monata, org. por Internacia Katolika Unuiĝo esperantista, 10-24 paĝ., Parizo; Katolika Vivo, por novaĵoj, 4 paĝ, ĉiun duan semajnon, Parizo; La Juna Batalanto, org. por Internacia junulara kaj paca movado, 16-20 paĝ. eld.1000, Kolonjo; La Ora Epoko, 16 Paĝ., monata, Svisujo; Kristana Revuo, ĉiun duan monaton, 16 paĝ., eld.1000, Anglujo; Espero Teozofia, org. por Teozofia esperantista ligo, kvaronjara, 16 paĝ., Praha. Oomota Internacia, kultura-religia monata revuo, org. por Universala homama asocio, 4 paĝ., Parizo; Oomoto, monata, 40 paĝ., Japanujo; La Nova Tago, org. por la bahaismo, 16 paĝ. Germanujo.

Sciencaj: Bulteno de internacia scienca asocio esperantista, 20 paĝ. eld. 700, Francujo; Internacia Medicina Revuo, 60 paĝ. Bruselo.

Komerca: La Komerco, oficiala org. por Komercista esperanto-unio, minimume 4 paĝ., Dresden.

Plie poŝt- kaj telegrafoficistoj, stenografoj, vegetarianoj kaj militrezistantoj havas siajn proprajn gazetojn.

Krom tiuj tute internaciaj gazetoj kaj revuoj la Esperanto-asocioj de la diversaj landoj eldonas gazetoj-n por siaj anoj, parte en esperanto, parte en resp. lingvo. Ili estas okdekkelkaj.

La cititaj nombroj estas prenitaj el statistiko de 1931.

La gazetoj kaj revuoj de Esperanto certe formigas la plej firman ligilon inter la esperantistoj de la mondo. Per kreado de efektiva internacia kulturo, antaŭ ĉio laŭ etika senco, ili ludas la saman rolon kiel la nacilingvaj publikigaĵoj por la naciaj kulturoj. La artikoloj, kiuj estas publikigataj en niaj internaciaj gazetoj kaj revuoj, kaj la kompreno, kiun ili spertas en la tuta mondo, evidentigas, ke la interfratiĝo kaj spirita komuneco de la popoloj ne estas plu nure utopio.

Naciaj Esperanto-federacioj.

Kiel la plejmulto de la sciigoj de tiu artikolo ankaŭ la sekvantaj estas prenitaj el aldono al Germana Esperantisto por jan. 1931, kaj la nombroj rilatas la staton je la fino de 1930. Tio estas la plej nova kompleta statistiko, kiu estas al mi akirebla. En pluraj landoj tamen la movado dum 1931 havis tre grandan alkreskon pro kio la nombroj tute ne korespondas al la nuna stato. - Mallongigoj: gr. - esperantogrupoj, m. - membroj, stat. - ĉiuj en. statistiko kunprenitaj esperantistoj, d. - delegitoj (de U.E.A.)

Eŭropo.

Albanujo: d. 1.

Belgujo: Belga ligo esperantista, 32 gr., 800 m. Policista grupo, studenta asocio, E-instituto. Flandra Esp.-federacio, gazeto, stat. 3359, d.46. Nedeviga fako en lernejoj kaj vesperlernejoj.

Bulgarujo: Bulgara esp.asocio, 26 gr., 500 m. gazeto, stat. 1744, d.28, Fako en la ŝtata blindulinstituto.

Danujo: Centra dana esp.ligo, 10 gr., 250 m. Instruistaj grupoj, gazeto. Stat. 990, d.16. La ministrejo por la ekstero tradukigis Esperante la tekston de dana turista filmo, kiu kun granda sukceso estis montrata en pluraj landoj.

Danzigo: Danziga E.-asocio, 4 gr., 132 m., 2 laboristaj grupoj, d.2. Nedeviga fako en la supra parto de la popollernejo.

Estonujo: E.-asocio de Estonio, 9 gr. 350 m., Gazeto, E.-instituto. Stat. 784, d.9. Fakgrupoj por laboristoj kaj fervojistoj. Nedeviga fako en la lernejoj: Ŝtata subvencio al la asocia gazeto. 1931 subvencis la magistrato en Tallinn 200 kr. al kursoj por fervojistoj.

Francujo: Socieo franca por la propagando de Esperanto, 17 distriktoj, 68 gr., 1704 m. Fakaj asocioj por katolikoj kaj poŝtoficistoj (300 m.) Sennacieca asocio tutmonda, Parizo, 6000 m. en 35 landoj, 3 gazetoj. - En Francujo estas eldonataj 11 E-gazetoj. - Stat. 5237, d. 170. - E.deviga fako je la komerca akademio en Le Havre kaj je la liceo St. Amand en Parizo, nedeviga fako en la popollernejoj, multaj komercaj lernejoj kaj liceoj. Publikaj lernejoj estas senpage disponeblaj por E-kursoj.

Grekujo: Helena E-asocio, 15 gr., 800 m. Gazeto, E-instituto. Stat. 1968, d.4, E-instruado permesita en la instruistaj seminarioj. Nedeviga fako en gimnazioj, popol- kaj mezgradaj lernejoj.

Irlando: Irlanda E-asocio, 3 gr. Asocio por katolikoj. Stat. 343, d. 1.

Islando: La nombro de la esperantistoj ĉ 500, d.1.

Italujo: Federacione esperantista italiana, 25 gr., 950 m. Gazeto, fakasocio por fervojistoj. 500 m. - Stat. 5341, d.62. La faŝista partio subtenas la movadon. Itala katedro de Esp. kontrolas instruadon kaj ekzamenojn. Instruado en Esp. je komercaj lernejoj estas rekomendata de la registaro.

Jugoslavujo: Jugoslava esp. ligo, 30 gr., 1118 m. Stat. 1994, d. 25. Katedro por Esp. en la komerca fakultato de la universitato Zagreb, E-instruado en la komerca altlernejo.

Latvujo: Latva E-asocio, 4 gr. 150 m. Gazeto, fakgrupo por laboristoj. Stat. 1498, d.18.

Litovujo: Litova E-asocio, 40 gr. 1195 m. Gazeto, d.9.

Nederlando: Nederlanda societo esperantista, 25 gr., 1300 m. Gazeto. - Nederlanda Katoliko, 800 m. - Nederlanda federacio de laboristaj esperantistoj, 350 m. - Stat. 6649, d.59, nedeviga fako en lernejoj. Internacia instruinstituto en Arnhem (Cseh) Nedeviga fako en komercaj lernejoj.

Norvegujo: Norvega Esp.-ligo, 5 gr., 100 m., instrugrupoj, laborista E-asocio. - Stat. 380, d.10.

Polujo: Pollanda E-delegitaro ampleksas 22 gr., 800 m. Gazeto. - Laborista esp. asocio "Laboro" ĉ. 400 m. Fakgrupoj por kuracistoj, instruistoj, tramistoj. - Stat. 4690, d. 74. Nedeviga E-instruado en la lernejoj permesita. 1931 la Jagellona universitato en Krakovo starigis katedron de Esp.

Portugalujo: Portugala E-asocio. Stat. 79, d.7. Azoroj: d. 1.

Rumanujo: Rumana E-asocio, 10 gr., 259 m. E-instituto kontrolas la instruadon. Stat. 1912, d.46.

Rusujo: Sovetrespublikara esp. unio, 4523 m. (1.10.1929), 3 gazetoj. Stat. 5726, d. ne premesitaj, propraj reprezentantoj. Laú konformaj atestoj el Rusujo Esp. havis eksterordinare grandan prosperon tie dum la lastaj jaroj. Pli nova raporto pri la membronombro prisciigis 16,000 organizitaj esperantistoj. 1931 katedro de Esp. je la universitato de Leningrado.

Svisujo: Svisa E-societo, 24 gr. 528 m. Fakgrupoj, katedro de Esp. je universitato. Sidejo de la internacia movado. Stat. 1821, d.44. - Esp. deviga en du komercaj lernejoj, nedeviga en tri komercaj kaj 4 mezgrandaj lernejoj. La poŝta administracio pagas la kostojn por kursoj por poŝtoficistoj.

Hispanujo: Hispana E-asocio, 3 distriktoj, 20 gr., 450 m., gazeto. - Kataluna esp. federacio, 15 gr. 800-900 m. gazeto. - E-instituto. Stat. 3591, d.51. 1931 la instruminstrejo subvenciis je 50,000 pesetoj instruadon de Esperanto.

Britujo: Brita esp. asocio, 105 gr., 2257 m. kaj 11 subdistriktoj, plie 2053 apartaj m. Gazeto. Stat. 7855, d.118. Esp. deviga fako en 8 lernejoj. E-instruado en 23 lernejaj klasoj en Londono.

Svedujo: Vidu detalan raporton sur paĝ. 19!

Ceñoslovakujo: Ceñoslovaka asocio esperantista, 30 gr., 500 m. Gazeto. - Germana E-ligo, 700 m. Gazeto. - E-instituto. Fakgrupoj. Stat. 8967, d.339. La foiroj en Reichenberg kaj Praha uzas Esp. Esp. deviga je la du blindilinstitutoj en Praha; je la teknika altlernejo en Praha estas instruata en Esp. de-post sex jaroj; lektoro en Esp. je Germana teknika altlernejo, nedeviga fako en 5 germanaj mezgradaj lernejoj, 7 daúrigaj lernejoj (Bürgerschulen) kaj popollernejo.

Germanujo: Deutscher E-Bund E.V., Berlin. 9 distriktoj, 123 lokaj grupoj, 2240 gr.m., 131 apart. m. Gazeto. - E-instituto, Leipzig, kun ŝtata kaj privata subteno. - E. Vereinigung deutscher Lehrer,

Leipzig, 500 m. E-Ver. sächsischer Lehrer, Dresden, 417 m. Mondasocio por instruistoj, Leipzig, 800 m. Gazeto. - Deutscher E-Blindenverband, Breslau, 116 m. - Mondasocio por blindaj esperantistoj, Düren, 380 m. Gaz. Arbeiter- E-Bund für die deutschen Sprachgebiete, 228 lokaj grupoj kun 3887 m. Gaz. - Laú statistiko de la germana E-instituto troviĝis en 1928 441 gr. kun 8490 m. kaj 22378 apartaj esperantistoj, loĝantaj en 1087 lokoj.- D. 274. - Esp. ordinare nedeviga en popol- kaj popolaltlernejoj, parte deviga. Multaj urbaj administracioj subtenas esp.-instruadon en la lernejoj ekonomie. - Fakasocioj por instruistoj, juristoj, sciencistoj, poŝt-, fervoj- kaj policoficistoj kaj komercistoj. ---- Esp. nedeviga fako en mezgradaj kaj pli altaj lernejoj en Saar-teritorio. D.8.

Hungarujo:

Hungara esp. societo laborista, 30 gr. ĉ. 1700 m. Gazeto - Hungarlanda E-societo, 14 gr.,630 m. Gazeto. E-instituto. Fakgrupoj por blinduloj kaj katolikoj. Stat. 3052, d.39. - Esp. nedeviga en mezgradaj lernejoj.

Aústrio: Aústria E-societo, 11 gr. 446 m., Gazeto - Austria laborista ligo esp., 61 gr., 1611 m. (dec.1929) Gazeto - Fakgrupoj por katolikoj, fervojistoj, teknikistoj, poŝtoficistoj, instruistoj k.a. Stat. 7696, d.61. De post 1917 lektoto en Esp. je la teknika altlernejo en Vieno. E-muzeo sub ŝtata kontrolo (sekcio de la nacia biblioteko). Esp. nedeviga en mezgradaj kaj pli altaj lernejoj kaj en la profesia lernejo en Linz.

Aliaj mondpartoj.

Afriko: Egiptujo: d.5. Alĝerio: d.1. Etiopujo: d. 1. Gineo: d.1. Kanariaj insuloj: d.1. Kongolando: d.2. Madeiro: d.3. Maroko: d.6. Mozambiko: d.1. Portug.Orientafriko: d.1. Rodezio: d.1. Sudafriko: d.3. Tanganjiko: d.1.

Ameriko: Nordameriko: Kanado: d.6. Usono: E-asocio de Norda Ameriko, 50 gr., 600 m. Gazeto. Nedeviga instruado je 20 universitatoj kaj kelkaj altlernejoj. Stat. 4845, d.80. Havaja insularo: d.2. Instruado en Esp. je la universitato en Honolulu.
Mezameriko: Stat. 207. Kostariko: d.1. Kubo: Societo Kuba por la prop. de Esp. d.2. Meksiko: d.3. Panamo: d.1.
Sudameriko: Argentino: Arg.E-asocio, 300 m.Gazeto, d.7. Brazilo: Brazila ligo esp., 10 gr., 250 m. Gazeto. Deviga fako je la altlernejo, Rio de Janeiro. D.10. Stat. 1182. Bolivio: d.1. Ĉilio: d.2. Kolumbio: d.3. Urugvajo: Urugvaja E-asocio, d.5. Venezuelo: d.1.

Azio: Ĉinujo: Nov-ĉinia E-asocio, 3 gazetoj. Stat. 476, d.6. Japanujo: Japana E-instituto, 2100 m. Fakasocioj por medicinistoj, farmaciistoj, fervojistoj, studentoj. Deviga je la blindulinstituto en Osaka kaj en la supra lernejo por knabinoj en Mie. 7 gazetoj. Stat. 6903, d.15. - 1931 radiokurso, je kiu 20000 lernolibroj estis vendataj. Birmanio: d.1. Hindujo: d.2. Koreo: d.2. Palestino: Stat. 252, d.2. Persujo: d.5. Rhodos: d.1. Sirio: d.3. Trinidad:d.1. Turkujo: d.4. Nederlanda Hindujo: instruista asocio, gazeto, d.7.

Aústralio kaj Oceanio: Aústralazia E-asocio, gazeto. Stat. 1087, d.13. Novzelando: The new Zeeland E-association, 205 m., 3 radiostacioj sendas Esp. Stat. 324, d.5.

La situacio de la esperantomovado en Svedujo je la fino de 1931.

De Ernfrid Malmgren.

Dum la lasta duona jardeko la sveda esperantomovado gajnis tre grandan disvastiĝon. Gi nuntempe ne estas movado nur por malmulto da personoj, pri kiuj eksterstarantaj skuas siajn kapojn kaj aldoni la nomon utopiulojn. La lingvo estas disvastigita al la plej vastaj rondoj, malgraŭ ĝi preskaŭ tute ne havis la helpon de ekonomiaj rimedoj. Sole la interna forto de la ideo faris la rezultatojn. La rilate malgranda propagando kiu estas farita oni ĉiam devis fari diletante pro manko de mono. La sveda esperanto-movado daŭre atendas donacistojn! Sed malgraŭ la manko ĝis nun, la sukcesoj estis, kiu jam estas dirita, tre rimarkindaj.

La kaŭzo de la sukcesoj ĉefe estas, ke la movado en Svedujo estas bone organizita. Tre bonaj kondiĉoj reale ekzistas por alkonduki esperanton al la pozicio kiel la dua lingvo de la popolo, ĝia internacia lingvo, devige lernota en la lernejoj.

Koncerne la nombron de esperanto-parolantoj, nun estas maleble sciigi precizan nombron. La cirkonstanoj estas precipe tiaj, kiaj koncerne la studadon de la naciaj lingvoj. Ni scias, kom da personoj, kiuj lernas ekzemple la germanan lingvon en la svedaj gimnazioj, sed estas praktike maleble sciigi kiom da personoj en Svedujo, kiuj necesbezone povas legi kaj kompreni la germanan lingvon. Tiuj, kiuj plej *fervore* studas la germanan lingvon aliĝas al la sved-germana klubo. Sed kompareneble nur estas tre malgranda nombro da homoj, kiuj tiel interesiĝas pri la lingvo, ke ili deziras daŭre ekzerci ĝin, aliĝante al la menciita klubo. Sammaniero agas la adeptoj de esperanto. Granda parto de tiuj, kiuj lernas esperanton, ne povas decidi sin aliĝi al esperanto-klubo. Oni diras, ke oni jam apartenas al multaj kluboj, cetere oni ja bone povas konservi la kontakton kun esperanto per iu esperantogazeto aŭ per literaturo en esperanto. Tre multaj homoj ne pripensas, ke la esperantoklubo krom la celo okazigi paroli la lingvon, ankaŭ devas esti la centro por la disvastigado de la lingvo, ke la esperantoklubo estas necesa por konservi la nombron de la esperanto-komprenantoj kaj antaŭ ĉio plimultigi tiun nombron tiel, ke ĝi fine ampleksos tiom da personoj, ke praktike preskaŭ ĉiuj komprenas la lingvon. Ĉiuj, kiuj studis esperanton, devas kompreni, ke estas tre utile por ĉiu esperantisto diskonigi la lingvon al aliaj. Per tio la uzebleco ja pligrandiĝos kaj oni mem havos la plej grandan avantaĝon de tio.

Nun kelkaj faktoj:

La lernolibreto kaj vortareto "Sisilo de Esperanto" estas svedlingve eldonita en 120,000 ekzempleroj. La elementa perkoresponda-kurso de Sveda Esperanto-Federacio ĝis nun havis pli ol 22,000 partoprenantojn. Kelkaj diversaj lernolibroj estas publikigitaj en kelkaj eldonoj: Ĉe tiuj la lernolibro de Paul Nylén havas la rekordon je 30,000 ekzempleroj. Ĉe la esperanto-rondoj de Laborista Kleriga Asocio dum la lastaj jaroj ĉiujare partoprenis ĉirkaŭ 4000 personoj. Ĉe kelkaj centoj da lokoj ĉirkaŭe en la lando estas esperanto-kluboj kaj el tiuj preskaŭ cent aliĝis al Sveda Esperanto-Federacio.

En Svedujo jenaj organizaĵoj ekzistas, kiujn oni povas rigardi kiel landligojn: Sveda Esperanto-Instituto, Sveda Esperanto-Federacio, Sveda Instruista Esperanto-Federaco, Sveda Laborista Esperanto-Federacio, Esperanta Turista Asocio kaj Eldona Societo Esperanto s.p.r.

Sveda Esperanto-Instituto estas estrata de direkcio je kvin personoj, elektitaj de estraro, kiu estas elektita de la tri "federacioj". Ĉe la instituto, kiu estis reorganizata en 1930, ĉirkau 100 personoj ekzameniĝis por la tiel nomata supera esp.-ekzameno kaj 1500 personoj por la malsupera esperantoekzameno. La instituto dum la lastaj jaroj disponis kelkajn eksterlandajn instruistojn por gvidi esperantokursojn en diversaj partoj de la lando. Kun tiuj eksterlandanoj kiel instruistoj kelkaj miloj da personoj lernis la fundamentojn de esperanto.

La membronombro de Sveda Esperanto-Federacio, kiu ĉiam estis malgranda, malgraŭ la granda nombro de esperanto-studantoj, pligrandiĝis dum la lastaj jaroj. Nun ekzistas ĉirkaŭ 2000 pagantaj membroj. Sveda Laborista Esperanto-Federacio havas ĉirkaŭ 1000 membrojn kaj Sveda Instruista Esperanto-Federacio pli ol 300 membrojn. Esperanto Turista Asocio estis refondata je la novjaro en 1932. Ĝia estraro, kiu estas nomata Esperanta Turista Komisiono, de 1929 aranĝis malkarajn turistvojaĝojn al Estonujo, Polujo kaj Anglujo, en kiuj vojaĝoj multaj centoj da turistoj partoprenis.

Diversaj internaciaj esperantoorganizaĵoj havas sekciojn aŭ delegitojn en Svedujo. Ekzemple Universala Esperanto-Asocio havas oficialajn delegitojn en 90 lokoj en la lando, Sennacieca Asocio Tutmonda en 79 lokoj, Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj en ĉirkaŭ 50 lokoj k.t.p. Fervojistoj, blinduloj, pacistoj kaj aliaj havas bonorganizitajn esperantolandligojn en Svedujo.

La svedaj esperantogazetoj: "Sveda Esperanto-Gazeto" (La Espero) kaj "Sveda Laborista Esperantisto" nun aperas en eldono de ĉirkaŭ 3000 ekzemplerojn respektive 2000 ekz. La membrogazeto de Instruista Esperanto-Federacio "Bulteno" nun estas eldonata al membroj de la menciita federacio. En Svedujo ankaŭ aperas la internacia organo de la blindularo "Esperanta Ligilo". Krom tio diversaj lokaj kluboj eldonis periodajn esperanto-gazetojn.

De ĝia komenciĝo en 1918 Eldona Societo Esperanto s.p.r. eldonis en esperanto tre grandan nombron da lerno- kaj legolibroj kaj ankaŭ vortarojn. Krom kelkaj originalaj verkoj, inter kiuj oni rimarkas "Bengalaj fabeloj" de la hindo Lakshmiswar Sinha, kelkaj notindaj tradukitaj verkoj estas eldonitaj. Inter tiuj estas rimarkindaj: Per balono al la poluso" de Andrée, Strindberg, Fraenkel, "Tra sovaĝa Kamĉatko" de Sten Bergman kaj "La junulino el Stormyr" de Selma Lagerlöf. En eksterlandaj eldonejoj elvenis tradukaĵoj de kelkaj verkoj de Aug. Strindberg. Kaj de la sveda aŭtoro Stellan Engholm aperis esperantoriginale la romano "Al torento".

Pruvo parte je la disvastiĝo de esperanto en Svedujo parte je ĝia uzebleco estas tiu prelegvojaĝo, kiu estis aranĝata dum 1929-1930 por la hinda instruisto Lakshmiswar Sinha. Li legis ĉirkaŭ 200 paroladojn en esperanto, je la plej multaj okazoj antaŭ la prelegkluboj de la lokoj kaj la paroladoj estis tradukataj sveden. Interpretisto kutime estis iu esperantisto el la respektiva loko. Li vizitis la tutan Svedujon de Trelleborg sude ĝis Abisko norde! Similajn prelegvojaĝojn eĉ se pli malgrandmezurajn oni poste aranĝis por la amerika bankisto Joseph Scherer kaj por la aŭstra ŝtatkonsilano H. Steiner.

Kaŭze de intereso pri esperanto de instruistoj esperanto je kelkaj okazoj estis ordinara lernfako por lernigi al la lernantoj gramatikajn sciojn. Tiuj provoj tute pruvis la taŭgecon de la lingvo por la lernigado de la sintakso. Dum du jaroj plue, en la stockholmaj popollernejoj esperanto-instruado estis aranĝata prove por la oka klaso dum la 4 semajnlecionoj rezervitaj por eksterlanda lingvinstruado. Oni vidis ke unu studjaro estas sufiĉa por havigi esperantosciojn responde al la malsupera gimnazia ekzameno en la naciaj lingvoj.

Per kunlaborado de Laborista Kleriga Asocio radiaj esperantoprogramoj estis dissendataj ĉiumonate unu fojon de la aŭtuno 1930. Krom tiuj esperantodissendadoj por la tuta lando, kelkaj lokaj radiostacioj havis oftajn periodajn esperantodissendadojn, ekzemple Eskilstuna, Falun, Gävle, Hälsingborg, kaj Uddevalla.

Eksterestantaj organizaĵoj pli kaj pli komencis atenti esperanton. Ekzemple: la svedaj geinstruistaj federacioj, Sveda Popollernejinstruista Federacio kaj Sveda Popollernejinstruistina Federacio, de la somero 1928 invitis al instruistkursoj en esperanto. Kaj la sveda parlamento la somerojn 1929, 1930 kaj 1931 donis sumon de 2900 kronoj por la aranĝado de tiuj kursoj. 200 geinstruistoj partoprenis en tiuj kursoj. Samtempe oni povas mencii ke partoprenis ĝin nun preskaŭ 1500 svedaj instruistoj kaj instruinstinoj en diverspecaj esperantokursoj.

Krom la ŝtatsubvenciitaj kursoj aranĝitaj de la geinstruistaj federacioj kelkaj komunumoj en Svedujo donis monan helpon al aranĝado de esperantokursoj por lernantoj kaj senlaboruloj. Ankaŭ la Reĝa Telegrafdirekcio en Stockholm en 1930 aranĝis esperanto-instruadon por kelkaj el siaj oficistoj. Krom tio la direkcio de Stockholma Tramvojaro dum multaj jaroj okazigis al la personaro partopreni en Esperantokursoj arangitaj de la direkcio. La rezultado estas, ke ĉirkaŭ 200 kondukistoj en Stockholm scias esperanton kaj rajtas porti la esperantan stelon sur la uniformo. Ankaŭ inter la tramvojkondukistoj en Göteborg kaj Malmö estas multaj esperantoparolantoj.

En la jaroj 1927, 1928 kaj 1930 la sveda regno donis subvencion al sveda delegito por ĉeesti ĉe la internaciaj esperanto-kongresoj tiujn jarojn.

Esperanto ricevis treege notindan aprobon kaj helpon de diversaj neesperantaj landligoj. Ekzemple la socialisma partikongreso, la kongresoj de socialisma gejunula federacio kaj sveda gejunula sobrecfederacio multokaze esprimis sian estimon pri esperanto kaj rekomendis al siaj membroj studi kaj praktike uzi la lingvon. Kaj en la regularo de Sveda Transportlaborista Federacio ekzistas programpunkto, kiu rimarkigas la taskon de la federacio ankaŭ labori pri la disvastigado de esperanto.

Ankaŭ diversaj turistfederacioj kaj ekspozicioj k.t.p. en Svedujo multokaze uzis esperanton kaj de ĝi havis praktikan utilon. Ekzemple la Balta ekspozicio en Malmö, la Göteborga kaj la Stockholma ekspozicioj presigis kaj disvastigis reklambroŝurojn en esperanto. Kaj la laboro de Esperanta Turista Komisiono por la Stockholma ekspozicio en 1930 ricevis oficialan aprobon de la ekspozicia reklamsekcio en letero al la prezidanto de Esperanta Turista Komisiono. En la letero oni legas inter alie. "La reklamagado de Esperanto Turista Komisiono en Estonujo por la ekspozicio sendube havis la plej grandan valoron por ni, kaj ni dankas antaŭ ĉio al vi ĝian realigadon."

Dum la lastaj jaroj la sveda publiko en alta grado metis sian atenton al esperanto, ne malplej kaŭze de la plejgranda parte afabla agmaniero de la ĵurnalaro.